



# Pos-Amiko

Aŭtuno, numero 34

*Pensu pri aliaj homoj, restu hejme kaj havigu la gazeton!*

## INDEKSO:

1. Katastrofa kresko da denaskuloj
1. UEA subtenas diversecon en landoj
2. Produktado de meoj falis
- 2 Ĉu TEJO kunsidas tro multe?
3. Kara Koko
3. NEJ-Novaĵoj
3. Horoskopo
4. EVENTOJ

## KOLOFONO

Pos-Amiko estas eldonaĵo de NEJ kaj aperas kvarfoje jare.

Redaktoro: Koko Poso

kkps.klackunveno@gmail.com

<http://kkps.esperanto-jongeren.nl/Pos-Amiko>

## Katastrofa kresko da denaskuloj

La retlisto de esperantistaj familioj antaŭvidas rekordan kreskon de novaj Esperanto-parolantaj familioj en 2021. Tio alportos diversajn loĝistikajn problemojn, ekzemple spacomanko en la Renkontiĝo de Esperantistaj Familioj, manko de suĉumoj kun malbonaj lingvoŝercoj, kaj ĉefe manko de gramatikaj libroj por estontaj gepatroj, kiuj finfine volas lerni seneraran Esperanton por ne malĝuste instrui al kreataj denaskuloj.

Diversaj teorioj ekzistas por klarigi la fenomenon, de pli multa libera tempo pro kvarantenoj ĝis manko de bonaj filmoj en kinejo, sed esploristoj de la Akademio Internacia de la Sciencoj ĉefe kulpigas la mankon de TEJO-kondomoj. Klarigas doktoriĝanto K. Ito: “En la antaŭaj jaroj kreiĝis diversaj verdaj paroj, kiuj kalkuladis je tio, ke TEJO protektas ilin. Sed sen ĉeestaj Esperanto-renkontiĝoj iliaj stokoj iam devis finiĝi, kaj ni nun vidas la rezultojn.”

## UEA subtenas diversecon en landoj

La Universala Esperanto-Asocio celas reprezenti esperantistojn el la tuta mondo, kaj mezuras tiun sukceson inter alie per la nombro da landaj sekcioj. Nuntempe, pro preskaŭ universala interretaliro kaj la fondaĵo Canuto, tiom multaj landoj estas jam reprezentitaj en UEA, ke ne restas multa ebla kresko. Tial ĝia estraro konsideras alian politikon por diversigi la asocion.

UEA mone kaj konsile subtenos separatismajn movadojn en diversaj landoj. La Pos-Amiko pridemandas:

Poso: “Kiel tiu ĉi agado helpas al la disvastigo de Esperanto?”

F.M.: “Por ke Esperanto paroliĝu kaj UEA reprezentu en laŭeble multaj landoj, ni povas organizi varbadon en kelkaj restantaj malgrandaj landoj, aŭ ni povas plialtigi, kiom da landoj ekzistas. Ni nun atingis la punkton, ke la dua estas pli facila solvo. Ni nun faras izolitan eksperimenton en Tigrajo en Etiopujo. Se tio evidentiĝos sukcesa, poste ni verŝajne provos subteni sendependemajn skotojn, flandrojn kaj katalunojn. Tiuj regionoj jam havas multajn esperantistojn, do sukcesoj tie tuj kreus pliajn landajn sekciojn de UEA.”

Poso: “Ĉu la asocio ne havas pli urĝajn financajn bezonojn, ekzemple pago de pensioj?”

F.M.: “Ni atendas, ke tio ĉi pagos por si mem, per plia rekono por Esperanto kaj profitoj el armilvendado. Tiu subteno de separatismaj grupoj vere estas kvazaŭ senriska politiko.”

## **Produktado de memeoj falis en tria kvaronjaro**

Ĝus aperinta ekonomia prognozo indikas, ke post rekordaj nombroj en K1 kaj K2 la memeproduktado signife malkreskis de julio ĝis septembro. La malkresko okazis ĉefe en grandaj grupoj, sed ankaŭ en malgrandaj grupoj videblis malkresko.

La memea sektoro antaŭe profitis de stimulado el la IJK-fonduso, sed tiu fonto nun elĉerpigis. Ĉar aliaj sektoroj (ekzemple varbado, komentoj kaj klaĉoj) dependas de memeoj, ekonomiistoj rekomendas pliajn investojn por stimuli inovaciajn memeproduktantojn.

## **Ĉu TEJO kunsidas tro multe?**

Junuloj ofte plendas pri tro longaj aŭ senutilaj kunsidoj, ne nur ĉe UEA, sed ankaŭ ĉe TEJO. En la nuna komitatokunsido estos tuta sesio por preparoli la realigplanon, post multaj estrarkunsidoj pri tiu ĉi sama plano. Antaŭe estis longa sesio pri buĝeto, dum kiu montriĝis, ke signifa parto de la buĝeto uziĝas por estrarkunsidoj. Kaj demisiis unu estrarano plendante pri “kunsidoj pri diskutoj, diskutoj pri kunsidoj, kunsidoj pri dokumentoj pri diskutoj pri renkontiĝoj pri diskutoj”.

Kiel la organizo solvu tiun ĉi problemon? La TEJO-estraro tuj anoncis starigi malfermajn horojn por diskuti la problemon kaj poste krei laborgrupon kaj agadplanon pri ĝi.

## Kara koko...

*“Kiel mia vivo ankoraŭ havas sencon, se KKPS kaj aliaj renkontiĝoj estas nuligitaj?”*

Kara homo,

KKPS ne estis nuligita, ĝi nur estas iom malfruiigita. Malfruigoj okazas en la vivo. Ekzemple pri la retpaĝo de UEA, aŭ la fina venko. Sed ni ja scias en niaj koroj, ke ili iam vere okazos.

Ne malĝoju pri tio, sed uzu la aldonan tempon por pli bone prepariĝi por KKPS. Mi ja ŝatus iam vidi verajn halovenajn kostumojn, ne simple malnovan vestaĵon kaj iom da ŝminko. Aŭ finfine iun prelegon, kiu ne estis kreita en la sama mateno.

Do jes, via vivo plu havas sencon: uzu tiun tempon por plibonigi vin mem por iĝi pli bona KKPS-partoprenanto.

*Poso*

Skribu viajn demandojn al [kkps.klackunveno@gmail.com](mailto:kkps.klackunveno@gmail.com)

## NEJ-Novajoj!

### Nova malnova NEJ-estraro

Prezidanto: Spencer v/d Meulen

Kasisto: Rogier Huurman

Sekretario: Robin van der Vliet

Estrarano: Agata Cichocka

Estrarano: Joost Franssen

### NEJ-tago

La Nederlanda Esperanto-Junularo organizos retan NEJ-tagon je merkredo la 30-a de decembro ekde 20:00, kadre de la JES-karavano.

## LA HOROSKOPO

- Ŝafo:** Pasigu en decembro valoran tempon kun viaj plej karaj plantoj.
- Taŭro:** Novembro estas bona monato por puĉoj aŭ artprojektoj.
- Ĝemeloj:** Vi ŝparis pri vojaĝoj kaj renkontiĝoj, eble mondvojaĝu per muzikdiskoj?
- Kankro:** Vi daŭre estas en kunsido, kaj pro tio vi ne legas tiun ĉi frazon.
- Leono:** Ni scias, kion vi faris!
- Virgulino:** Post ‘komuna seminario’ vi ne plu estos.
- Pesilo:** Dormu bone, aŭ vi maltrafos vian konekton dum reta karavano.
- Skorpio:** Tiu ĉi vintro estos bona tempo por investi en unupersonaj tabloludoj.
- Kalle:** Vi ricevos konsilojn pri ĵurnalismo de iu mistera koko.
- Sagitario:** Via najbaro deklaras sendependecon, bone gardu vian heĝon.
- Kaprikorno:** Se viaj kunloĝantoj ne volas lerni Esperanton, instruu dum dormado.
- Akvisto:** Stelo aperos en la mateno por montri al vi la vojon (la suno).
- Fiŝoj:** Ĉu mankas al vi familio? Kial ne krei propran?

## Sama KKPS, alia jaro

Bone, ni provis. Ni vere provis, kaj preskaŭ sukcesis. Sed tro multaj stultuloj infektis aliajn stultulojn, kaj ni devis ~~nuligi~~ prokrasti KKPS-on.

Do, de la 30-a de oktobro ĝis la 1-a de novembro 2021 finfine okazos la 9-a KKPS. Venontjare ni festos en ujutna nederlanda etoso en arbaro meze de nenie en Ravnsø ĉe Ry en Danio. Ne paniku tamen, la loko estas bone atingebla per trajno per la stacio Skanderborg.



*Vere? Plia jaro ĉi tie en malvarmo?*



*Ravnsøhytten daŭre staras en sama loko*

Krom la nederlandaj kutimaĵoj kiel duontaga ekskurso al Ĉiela Monto, halovena balo kaj noktaj manĝoj estos ankaŭ danaj tradicioj kiel gløgg, æbleskiver kaj biero kontraŭ malpli ol eŭro ( $\approx 7,46$  kr).

Konklude, esperante je sukcesaj vakciniĝoj kaj fino de la senfinaj kvarantenoj, ni ripetas:

**Ne estu koko, venu al KKPS!**

La retpaĝo daŭre estas <http://kkps.esperanto-jongeren.nl>, kial ĝi ŝanĝiĝus?